



№ 137, decembro 2023

ELDONO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO (REU)

Jubileoj

Gratulojn al G. Kokolija!

La 18-an de decembro jubileas Garik Kokolija!

Multajn gravajn brikojn enmetis Garik en la E-movadon: prezidantis, organizis, kantis kaj kantigis, redaktoris, estis animo de multaj arangoj, renkontiĝoj, festivaloj, kongresoj.

Ni bondeziru al nia samideano kaj kara amiko fortan sanon, daŭran aktivan vivon, amon kaj ĉion la plej helan!!

*De la nomo de REU-Estraro
Svetlana Smetanina*

Hodiaŭ festas sian 60-jaran jubileon (nekredeble!) nia ĉiam juna anime Garik! Longan, sanan kaj feliĉan vivon al vi, kara amiko!

Vi ĉiam estis animo de la rusia Esperanto-movado, kaj via kontribuo al ĝi estas nesupertaksebla! Via agado estas daŭriginda kaj daŭrigenda!

Bonfarton kaj energion!

Galina Terentjeva, Nikolao Terentjev



Dilara Gadirova jubileas kaj prezentas sin

Fuĝas tagoj, semajnoj, jaroj... kaj neeviteble jubileoj venas. La 25an de novembro 2023 festas sian estimindan jubilean naskiĝdaton **Dilara Gadirova**. Hodiaŭ vi povas legi intervjuon kun la jubileulino, kiu malkovras sekretojn de sia aktiva malindiferenta vivpozicio.

Gadirova (Mametova) Dilara Nailjevna (25.11.1953), naskiĝis en Tobolsko, studis en Tjumena universitato, instruistino de la angla lingvo, emeritino, esperantistiĝis en 1974 en Tjumeno (kursgvidanto: Kalaŝnikov Aleksandr Petroviĉ), individua membro de REU, Bahaa Esperanto-Ligo (BEL), loĝas en Tobolsko. En la studenta periodo Dilara Gadirova aktivis en la junulara esperantista klubo "Revo" (1974 — 1978), partoprenis multajn regionajn kaj tutlandajn esperantistajn renkontiĝojn kaj somerajn tendarojn, instruis Esperanton en Tjumeno kaj Tobolsko kaj en someraj dumarangaj kursoj. Nun ŝi kunlaboras kun uralaj esperantistoj. Dilara Gadirova estas aktiva membro de la bonfara urboprotekta organizaĵo "Bona volo", kiu strebas konservi malnovan arkitekturan aspekton, historiajn kaj kulturajn heredaĵojn de la urbo Tobolsko. ("Esperanto enUralo", parto 1, oktobro 2020, paĝo 44)

a) *Dilara, vi naskiĝis en la malnova siberia urbo Tobolsko. Kiujn momentojn el via infaneco, ligitajn kun via hejmurbo, viaj gefamilianoj kaj geamikoj, vi povas konsideri feliĉaj? Kiuj eventoj rimarkeble influis vian evoluon, mondkoncepton, pensmanieron?*

Mia infanaĝo estis plena de feliĉaj pozitivaj momentoj. Nur imagu, kiom da multaj ŝatokupoj mi havis dum lerneja periodo: baleta danco, librelegado, partopreno en teatraĵoj en loka biblioteko, pianludo kaj traduko de rakontetoj en la anglan lingvon, kaj ĉio estis ne por momento, sed sufiĉe longdaŭra, por jaroj. Verŝajne, mi strebis kontakti diversajn homojn kaj provis trovi mian estontan vojon. Certe, multe edukas ankaŭ la ekzemplo de la gepatroj. Miaj gepatroj estis instruistoj en lernejo. Ili estis tre okupitaj. Hejme ili prepariĝis al lecionoj, mi kaj mia fratino ĉiam komprenis ilin kaj kondutis kviete, senbrue. Ili estis sindonaj al la profesio. Krome ili estis kreemaj homoj. Mia patro instruis geografion. Kaj li estis tre inventema homo: li estis la unua en Tjumena regiono, kiu faris instruĉambron de geografio kun aŭtomataj kurtenoj kaj filmoprojekciilo. Mia panjo organizis teatron de instruistoj en la tataraj lingvo, kiun ŝi instruis. Rigardante ilin, mi komencis kompreni, ke la profesio de instruisto postulas multajn kapablojn.

b) *Vi estis edukata en la familio de tataraj geintelektuloj. Kiun modelon de la familia vivo viaj gepatroj heredigis al vi? Kion vi*



taksas nun kiel neforgeseblan trezoron en la memoro pri la interrilatoj inter viaj gepatroj kaj vi kaj via fratino?

Miaj karaj gepatroj montris ekzemplon de amo kaj mirinda interkompreno! Ili ne substrekis tion antaŭ homoj, sed faris ĉion, pensante unu pri la alia. Ili ne kverelis antaŭ ni, mi konsideras tion tre bona. Kvankam panjo estis tre milda laŭ la karaktero, kaj paĉjo povis esprimi sin pli emocie, sed la zorgo de unu pri la alia estis grava ĉiam kaj restis ĝis la lasta tago...

Kaj mi zorgis pri mia fratinetto, kiu estis pli juna ol mi je du jaroj, en mia infaneco, sed niaj vivovojoj estis diversaj, kvankam spirite unuecaj.

c) Vi studis en Tjumena universitato en la fakultato de ĝermana-romana filologio, fariĝis instruistino kaj kelkajn jardekojn ĝis la emeritiĝo vi laboris en via hejmurbo en la eduka sfero, perante la anglan lingvon al infanoj kaj studentoj. Kiam kaj kial vi definitive fordonis vin al la ideo fariĝi lingvoinstruistino?

Mi jam menciis antaŭe, ke en la infaneco mi ŝatis traduki rakontetojn el la angla lingvo en la rusan. Tio estis por mi ĝuo, ĝojo! En la naŭa kaj deka klasoj de la lernado lecionoj de la angla lingvo estis ege tedaj kaj malinteresaj. En mia kapo kaŝe aperis la ideo iĝi instruisto, kiu gvidos lecionojn absolute alie — energie, alloge kaj komprenante lernantojn. Pli poste mi paŝon post paŝo antaŭeniris al tiu ĉi mia revo, studentiĝis en la fakultato de fremdaj lingvoj en Tjumena ŝtata universitato, kun granda intereso studis tie kaj, fininte la universitaton, revenis en mian naskiĝurbon por instrui infanojn pri la angla lingvo.

d) De antaŭ kvindek da jaroj Esperanto estas parto de viaj mensa, intelekta, sociorientita vivo kaj aktivado. Kiel vi taksas nun vian multjaran apartenon al la medio de esperantistoj? Kion neordinaran kaj vivigan vi ĉerpis kaj ĉerpas el tiu Esperanto-fonto, kiun kreas la komunumo de samlingvanoj-geamikoj?

La demando estas tre malfacila por respondi, ĉar ne eblas kurte klarigi la rolon de Esperanto en mia vivo. Esperanto por mi aperis dum la unua studjaro de mia studado en Tjumena universitato, kaj ĝi iĝis neapartigebla de mia vivo. Ĝi multe helpis min en la lernado de la franca lingvo, precipe en la legado. Aparteno al la medio de esperantistoj permesis al mi reale paroli fremdan lingvon dum klubaj kunsidoj kaj unterurbaj renkontiĝoj, ne dum lecionoj. Krome la mondo de Esperanto, kiun mi eniris, estis tre alloga, interesokapta, tre vigla. Estis bonega kompanio de geamikoj-esperantistoj, kun kiuj mi multe vojaĝis, kun ili partoprenante diversajn Esperanto-eventojn, mi mem organizis multajn Esperanto-renkontiĝojn en Tjumeno. Ankaŭ nun mi perceptas la mondon pere de Esperanto, ĝiaj idealoj kaj ne ĉiam mi povas kompreni misteraĵojn, kiuj okazas inter ni, esperantistoj.



e) Via tuta vivo estas ligita kun via amata urbo Tobolsko, vi estis kaj estas atestanto de ĝiaj kontinua evoluo, kresko kaj vastiĝo, plibeligi, moderniĝo. Kio estas por vi Tobolsko, espereble ne nur ŝatata fierindaĵo, tuŝanta vian animon per memorindaj historiaj faktoj de la plurjarcentaj diakronaj peripetioj ĝis la nunaj tagoj tre impetaj kaj ritmaj?

Kvankam Tobolsko, kiu akceptis ambasadorojn de aziaj landoj en la 17-a jarcento, estis konstruita laŭ la projektoj de moskvaj arkitektoj, ĝi ne povas nuntempe vidigi ĉion kreitan de ili antaŭ kelkaj jarcentoj, konserviĝis nur la Kremla ensemblo kaj stratdirektoj. Jes, ni konservis la unikan pitoreskan kelkilkilometran panoramon, kiun tamen oni volas ŝanĝi per altaj konstruaĵoj. La fakto, ke antikvaj lignaj kaj briks-tonaj domoj, historia popola heredaĵo, estas detruitaj, ĉagrenas multajn urbanojn. Ĝuste pro tio estis fondita organizaĵo “Bona volo”, kies membroj ĝis nun provas ŝanĝi la plorindan situacion, strebas atentigi samurbanojn pri la problemoj. La tutrusia projekto “Tom Sawjer-Fest”, al kiu ankaŭ nia organizaĵo aliĝis, helpis nin renovigi 4 lignajn domojn dum la lastaj 3 jaroj. Diversaĝaj volontuloj laboris somere, libervole purigis kaj dufoje farbis murojn kaj fenestrojn de elektita privata domo. Tiuj homoj, kiuj subtenis nian ideon, montris sian pretecon plibonigi la aspekton de multjaraj domoj per nia volontula laboro, estas la plej fidindaj por mi. Ĉi-jare multaj volontuloj venis el diversaj sociaj organizaĵoj kaj entreprenoj, kaj eĉ deputitoj helpis nin! Oni povas diri, ke la “glacio ekmoviĝis” — la afero antaŭen ekiris, sed renovigi la aspekton de du ĉefaj historiaj stratoj de la urbo ne eblas, ŝajne, eĉ dum 10 jaroj. Ja oni ne aplikas la saman rapidecon, kian oni uzas dum la konstruado de naftaj uzinoj.



PONTO n-ro 137, decembro 2023

f) La sorto de via hejmurbo, restaŭrado kaj protektado de ĝiaj historiaj objektoj: iom post iom ruiniĝantaj monumentoj, malnovaj urbopartoj, stratoj, preĝejoj, aŭtentikaj kvartaloj kaj domoj en la stilo de tradiciaj siberiaj traboĉarpentaĵoj ĉiam zorgigis vin tiel, ke vi aliĝis al la urboprotekta soci-bonfara organizaĵo "Bona volo" kaj post multaj jaroj da senlaca filantropa aktivado i.a. kiel unu el ĝiaj elstaraj gvidantoj vi daŭre kaj persiste movas libervole ĉi tiun pezegan ŝtonon. Kio motivas vin ne lasi la aferon, partopreni la movadon de volontuloj, aktivigi novajn formojn de kunlaborado kaj plu alarmi urbajn aŭtoritatojn kaj samurbanojn pri ĉiu fakto de neglekto, malzorgo kaj damaĝo al historiaj konstruaĵoj kaj objektoj de Tobolsko?

Vi nomas mian deziron vidi mian urbon pli bela "pezega ŝtono". Mi ne pensas tiel. Se estas kelkaj homoj-samideanoj, do, tio jam estas teamo, kiu povas atingi bonajn konkretajn celojn! Kaj vidi poste belajn rezultojn de nia senlaca laborado estas ja vera ĝojo por ni! Tial troviĝas kaj forto kaj energio, kaj inspiro kaj kreemo por daŭre okupiĝi pri ĉio ĉi.



"ДОБРАЯ ВОЛЯ" город Тобольск

"Bona volo" Tobolsko

g) En oktobro 2023 via nomo estis enskribita en la Honorlibron de la urbo Tobolsko pro via ekskluziva kontribuo al la disvolvo de la urbaj etnografio kaj historio kaj la popularigo de la histori-kultura heredaĵaro de Tobolsko kaj Tobolska distrikto. Ĉu la fakto, ke oni honoris vin kaj aprezis vian agadon, signas iun certan bilancan linion, halton, ripozpaŭzeton aŭ vi rilatas al ĝi kiel al nova eventoplana etapo sur longa vojo al ĉiam alcelataj idealoj?

Mi ĝojas, ke per tiu fakto oni aprezis la tridekjaran aktivadon de nia kolektivo "Bona volo". Tamen ni ne volas halti kaj fari paŭzon. Ni deziras partopreni en la tutlandaj projektoj kaj daŭrigi kiel eble pli sukcese kaj fruktodonela savadon de unikaj arkitekturaj objektoj de nia belega historia urbo Tobolsko kaj ĝue kaj kun fiero vivi en tiu ĉi mirinda loko sur la tero.

Dilara, mi dankas vin por viaj respondoj kaj deziras al vi ĝojan jubilean feston kaj multajn jarojn da interesa kaj aktiva vivo!

Intervjuis Vladimir Opletajev



REU-Estraro informas

Skiza laborplano de REU-Estraro por la jaro 2024


- Tutlandaj amasaj aranĝoj:
 - Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-24) aŭgusto, Mahaĉkala, Ĵeleznovodsk, Kislovodsk aŭ aliloke;
 - Tihvinaj Esperanto-Metiejoj (TEMoj-24) julio, Tihvin;
 - Rusiaj Esperanto-Noktoj (REN-24) februaro, Apudmoskvo, Sankt-Peterburgo aŭ aliloke.
- Distancaj aranĝoj:
 - Aŭtunaj kaj Printempaj Esperanto-Forumoj (=tutlandaj zoom- renkontiĝoj) novembre, aprile, septembre. Temaro laŭ propono kaj bezonoj.
- Distanca belarta konkurso laŭ diversaj ĝenroj.
- Propagando, agitado, reklamado de Esperanto kaj REU tra la lando diversmaniere : prelegoj, gazetaraj konferencoj, kunlaboro kun aliaj nekomercaj organizoj (bibliotekoj, universitatoj, ktp).
- Kreado kaj funkciigado de Tutlanda Informa Centro pri instruado kaj funkciado de diversnivelaĵoj kaj rondetoj.
- Trejnado de instruistoj kaj instruantoj kun posta ekzameniĝo kaj ricevo de instruarjtagaj dokumentoj.
- Restarigo de kunlaboro kun Ministerio pri klerigo koncerne fakultativan instruadon de Esperanto en lernejoj.
- Daŭra laboro pri regionaj reprezentantoj, ties registro, spertinterŝanĝo, interhelpo. Organiza laboro en regionoj.
- Laboro pri histori-kultura E-heredaĵo. Ciferigo de havataj historiaj foto-videomaterialoj.
- Eldona agado. Landaj periodaĵoj. Produktado de ceteraj libroj, broŝuroj, reklamiloj, ktp laŭ neceso kaj bezono.

Nova lernojaro enkadre de EToSo (FOTOJ)

Fine de ĉi-jara oktobro komenciĝis la nova E-lernojaro por ruslingvanoj per Zoom-programo. La platformon por la lecionoj disponigas ILEI (Internacia Ligo de Esperantistoj-Instristoj).

Tiu-ĉi lernojaro estas jam la tria, tial aperis ioma sperto en distanca E-instruado, kiu havas sian specifecon. Ankaŭ preciziĝis/reguliĝis kondiĉoj por partoprenantoj en la kursoj. Unu el la primaraj taskoj memkompreneble estis trovi gelernantojn. Tiun celon bonege plenumis miaj pasintjaraj gekursanoj, kiuj aktivas en la rusiaj sociaj retlistoj kaj kiuj publikigis mian anoncon tie. Same aliaj nialandaj E-aktivuloj volonte disvastigis ĉi iniciaton.


La informo estis publikigita ankaŭ en la retejo «Eventa Servo» (<https://eventaservo.org/e/484193>).



Tiam estis anoncitaj 2 kursoj: la baza kaj la mezgrada. Post apero de la anonco komenciĝis torento da petskriboj por aliĝi al la kursoj. Entute aliĝis pli ol 40 personoj, kio estas tro multa kvanto por ke E-instruado/lernado estu sukcesa. Sed, kiel kutime, kelkaj personoj jam forlasis lernadon pro diversaj kialoj: okazis t.n. «natura selektado». Sed eĉ nun post 7 duhoraj ĉiusemajnaj lecionoj en ambaŭ grupoj restas 30 diversaĝaj personoj el multaj regionoj de Rusio kaj el pliaj 9 landoj: iuj konatiĝas kun bazaj E-gramatiko kaj leksiko, aliaj profundiĝas en diversajn aspektojn de Esperanto, lingvo kaj kulturo.

La rusiaj gelernantoj de ambaŭ kursoj aktive subtenis la retejon de la vortaro <https://rueo.ru/> monĝirinte pli ol 19 mil rbl., kio estas konsiderinda sumo por ĝia funkciado. Tiu ago de la kursanoj estas imitinda por aliaj E-rusianoj. Dum la unua leciono de la mezgrada kurso s-roj Renato Corsetti (Italio/Britio) kaj Ahmad Mamduhi (Irano) salutis la ĉeestintajn gekursanojn, kio estis kuraĝiga por la lastaj. Por havi plian imagon pri la nun okazigataj kursoj oni legu la artikolon «EtoSo» de A.Mamduhi, prezidanto de ILEI, kaj de N. Pimenov, studento de unu el moskvaj universitatoj kaj E-kursano de la pasintaj lernojaroj, aperinta en la oktobra numero de la revuo «Esperanto» de UEA kaj prezentita sube.

Tatjana G. Loskutova (Ivanovo)



Edukado

Pri EToSo

■ Ahmad Mamduhi

Ekde la 10-a de majo ĝis la 19-a de julio 2020 mi ĉiusemajne intervjuis profesoron Renato Corsetti 10 fojojn, ĉiufoje dum pli-malpli unu horo. La intervjuoj, kiuj okazis vive per Zoom, estis publike antaŭanoncitaj tiel, ke interesiĝantoj povis libere partopreni en ili kaj eĉ prezenti siajn demandojn fine de mia intervjuo. Average eble ĉ. 20 personoj el diversaj landoj ĉiufoje ĉeestis la intervjuojn. La kompleta registrajaro spekteblas en: <https://www.aparat.com/playlist/517807>.

En ĉiu intervjuo mi demandis la opinion de prof. Corsetti, i.a. pri unu el la plej gravaj esperantistoj de nia movado, ekzemple Hector Hodler, Edmond Privat, Ivo Lapenna, ... kaj Tibor Sekelj. Kiam li estis parolanta pri Tibor Sekelj, kiu i.a. vojaĝis al eble ĉ. 100 landoj kaj en plejmulto el ili okazigis Esperanto-kursojn kaj/aŭ fondis Esperanto-asociacion aŭ -societon, ekaperis la ideo pri la projekto «Esperanto-kursaro Tibor Sekelj» (EToSo). La projekto, kiu komenciĝis per la iniciato de la profesoro kaj per helpo kaj rimedoj de la Irana Esperanto-Asocio (IrEA), disponigas libere (senpage) senliman Zoom-konton al ĉiu, kiu deziras okazigi Esperanto-kurson en etna lingvo aŭ en Esperanto, aŭ eĉ volas instrui iun fakon aŭ arton per Esperanto al ĉiu deziranto.

Kadre de la projekto ĝis nun okazis Esperanto-kursoj en la taja (fare de Ĵaz Bharuj Rojanasoonthon), la indonezia (Ilia Dewi), sŭahila (Nino Vessella & Élisée Byelongo), vjetnama (Hoan Tran, Ĝojo), kurda (Ŝler Karimi), araba (Jasmin Bahri & Taled Orabi), persa (Hamzeh Shafiee & mi), rusa (Tatjana Loskutova), ĉina (Liru Chen) kaj Esperanto (Renato Corsetti, Trevor Steele kaj Tatjana Loskutova). Ĉ. 90 fojojn okazis origami-atelieroj fare de Larysa Osadchuk kaj Alain Delmotte. Dankante elkore ĉiujn, kiuj ĝis nun gvidis la kursojn, mi nun reinvitas ti-

ujn, kiuj deziras komenci kurson kadre de EToSo, bv. kontakti profesoron Corsetti (renato.corsetti@gmail.com) aŭ min (mamduhi@gmail.com).

Ekde la jaro 2022 ILEI sin montras (morala) subtenanto de EtoSo, i.a. per disanoncado pri ĝi por kreigi novajn kursojn en aliaj lingvoj kaj/aŭ pri aliaj fakoj.

Feliĉe la kursoj estis/as popularaj kaj fruktodonaj, kion atestas i.a. la raporto de unu el la kursanoj de la Esperanto-kurso por ruslingvanoj gvidita de Tatjana Loskutova, kiun vi povas legi ĉi tie.

■ Nikita Pimenov

Unuafoje mi eksciis pri Esperanto antaŭ kelkaj jaroj, estante adoleskanto. Ekde infanaĝo mi interesiĝas pri fremdaj lingvoj, kaj iun tagon mi trovis etan milvortan Esperanto-vortaron kaj eklernis ĝin. Tio estis la unua fojo, kiam mi eksciis pri ĉi lingvo, sed nur nomine. Ĉiujn sciojn pri la lingvo mem kaj pri la sferoj de ĝia apliko, kiujn mi nuntempe havas, mi akiris en la lecionoj de Tatjana G. Loskutova. Sed tiam, antaŭ kelkaj jaroj, mi apenaŭ povus imagi, ke ĉi lingvo havas tiom riĉan kulturon.

Eklerninte la vortaron ĝisfunde, mi tuj forgesis pri la lingvo por ĉiam: mi almenaŭ ne okupiĝis pri ĝi plene, kaj mi tute ne komprenis, por kio ĉi lingvo uzeblas. Ĝis iu februara



Tatjana G. Loskutova

vespero, kiam, trarigardante la retnovajojn en la rusia socia reto VK («En Kontakto»), mi trafis afiŝon anoncanta la kurson por komencantoj-ruslingvanoj de T. G. Loskutova kadre de «EtoSo».

Mi tiam pensis «kial do ne?» kaj sendis mian aliĝilon perrete. Mi ĝis nun ĝojas, ke mi decidis enskribiĝi por la kurso, ĉar danke al mia konatiĝo kun la instruistino kaj la valorega sperto, kiun donis al mi la lecionoj kun ŝi, mi ekkonsciis, ke iagrade mi volas ligi mian vivon kun la E-movado.

Jen la unua leciono baldaŭ komenciĝos. Mi estas en ekscita antaŭĝuo pri io nova (certe, tio ja estas la unua fojo, kiam mi renkontas verajn Esperantistojn!), ŝaltas la komputilon, kontrolas la funkciadon de la kamerao kaj la mikrofono. Mi sekvas la ligilon. La leciono komenciĝis.

En la unua leciono ni lernis legi. Sed ekde la dua ni jam eklernis vortojn kaj respondis simplajn demandojn. Mi estu honesta: mi pensis, ke mi fanfaronos almenaŭ pri mia posedo de vortprovizo, sed dum la lecionoj mi komprenis, kiom malmulte mi scias kaj kiom da eraroj mi faras en mia parolado. Mi neniam antaŭe praktikis parolkapablojn – estis neniu, kun kiu eblus paroli Esperante.

Ĉiu leciono estis strukturita tiel, ke ĉiuj kvar lingvaj scipovoj estis inkluditaj en ĝi: legado, aŭskultado, parolado kaj skribado. En la lecionoj ni legis eltondaĵojn el artikoloj kaj E-beletraĵoj (ĉefe fiksiĝis en mia memoro la rakonto «Mamutido Miĉjo» de Mikaelo Bronŝtejn), aŭskultis la paroladojn de aliaj Esperantistoj per sonregistraĵoj aŭ videoj (iom poste ni persone komunikis precipe kun eksterlandaj E-gastoj kaj trejnus nin pri du scipovoj samtempe: parolado kaj aŭskultado), ĝuste en la komenco ni jam iomete parolis kaj iel respondis la demandojn de la instruistino. Ni trejnus nin pri la skribokapablo jene: plej ofte, kiel hejmtaskon, ni skribis iom malgrandan tekston pri difinita temo aŭ skribe respondis demandojn pri iu teksto, kaj en la sekva leciono ni kontrolis tion, kion ni skribis.

Kaj ankoraŭ pri la gastoj: poste, kiam ni atingis certan lingvonivelon, Tatjana komencis inviti diverslandajn gastojn al niaj lecionoj, kun kiuj ni komunikis. Ni konversaciis pri diversaj aferoj: kaj pri la specifaĵoj de niaj landoj kaj kulturoj, kaj pri ĉiutagaj temoj. Kutime por tio ni disponis unu horon antaŭ la leciono. Ĝi estis verŝajne la plej bona horo, kiun mi atendis ĉi-semajne. Mi tre ŝatis komuniki en Esperanto, prononci sonorajn vortojn kaj konstati, ke mi komprenas la interparolanton. Ĉiuj gastoj, post komunikado kun ni, esprimis la saman admiron pri nia lingva nivelo.

La baza kurso, ŝajnas al mi, celis lernigi paroli, kaj la mezgrada ĉefe proponis enprofundiĝi en la E-kulturon. Sed por mi, la mezgrada kurso estis bonega maniero konservi la bezonatan lingvonivelon. Ni ankaŭ multe parolis, spektis kaj aŭskultis.

Multaj diros, ke unufoja perreta leciono semajne ne sufiĉas por ellerni la lingvon, nek por plu konservi la atingitan nivelon. Sed persone por mi



tioma ofteco de lecionoj estis pli ol sufiĉa: lecionoj ne malhelpis la ĉefajn agadojn/okupigojn kaj, kiel montriĝis, estis sufiĉe efikaj. Tiuj du horoj semajne fariĝis ideala kialo pasive (per aŭskultado kaj legado) kaj aktive (per parolado) konservi la lingvan nivelon. Krome, mi rimarkis, ke ankaŭ mia pasiva vortprovizo pliiĝis: danke al tio, ke ni parolis nur Esperanton. Ĝuste en la komenco ni sufiĉe rapide (preskaŭ tuj) ekuzis Esperanton anstataŭ la rusa.

Nun mi vere sopiras ĉi lecionojn: mi sentas la deziron paroli Esperanton voĉe, formuli pensojn en ĉi lingvo.

Ambaŭ kursoj (la baza kaj la mezgrada) multe donis al mi. Krom la fakto, ke mi ellernis la lingvon, mi ekkonis la E-komunumon. Ĝi montriĝis tre malferma kaj mi fariĝis ĝia parto. Mi opinias, ke la ĉefa tasko de iu ajn instruisto estas pli malfacila ol nur doni certajn sciojn pri la studobjekto. Ĉi tasko estis grava en la antaŭ-informa socio. Nun la tasko de la instruisto estas ensorbigi amon kaj intereson pri la studobjekto, kaj tiam la studento/kursano mem studos ĝin. Do, Tatjana G. Loskutova malfermis la E-komunumon por mi kaj montris, ke mi estas bonvena kaj utila en ĝi.

Renkontiĝoj

Esperanto Forumo en ZOOM

La 2-an de decembro sukcese pasis la unua vasta Zoom-renkontiĝo «Esperanto Forumo», kiun partoprenis pli ol 50 personoj el diversaj loĝlokoj de nia lando: Moskvo, Sankt-Peterburgo, Tihvin, Krasnojarsko, Birobiĝano, N. Tagilo, Tomsko, Ufo, Rostovo, Voronejo, Ivanovo, Vladimiro, Surtuto, Krimeo kaj multaj aliaj.

Estis prezentitaj 4 blokoj kun diversaj temoj:

- movada — «Zamenhof kiel reprezentanto de «Rusa Kosmismo»- prelegis N. Gudskov;
- instruista — «Ruslingvaj E-lerniloj en la moderna periodo de nia lando» — prelegdiskutis A. Grigorevskij;
- literatura — Unu novelo el la libro «Lecionoj por viro» — voĉlegis M. Bronŝtejn. Ankaŭ estis prezentitaj kelkaj poemoj;
- muzika — koncertis M. Povorin. Estis aŭdigita nova kanto al versoj de K. Ilutoviĉ «Grandan dankon, majstro Zamenhof!»

La renkontiĝo daŭris 2 plenajn horojn kaj ŝajne tio estis malmulte.

Estis ricevitaj multaj dankoj pro bona organizo kaj enhavo. Same aperis proponoj organizi similajn renkontiĝojn 1-foje dum 3 monatoj.

Dankon al la prelegintoj!

Svetlana Smetanina

P. S.: Kiel pasis la Forumo, vi povas spekti en Jutubo: <https://www.youtube.com/watch?v=AjojLL26sU>



Ruslingvaj Esperanto-lerniloj en la nuna periodo de nia lando

Oni diras, ke en la mondo estas milionoj da esperantistoj. Foje oni povas legi pri 20 milionoj da supozataj E-lingvanoj en la mondo. Tiu aserto baziĝas i.a. je la kvanto de la venditaj lernolibroj de Esperanto — en tiu aserto 100 milionoj ekde la apero de la lingvo.

En tiu ĉi prelego mi prenas la nunan Rusion kaj la periodon ekde la disfalo de la Soveta Unio.

(La datumoj en la prelego estas bazitaj je Katalogo de E-lernolibroj, publikigita en reu.ru: https://reu.ru/prenu/katalogo_de_esperanto_lerniloj.pdf)

La plej konataj E-lernolibroj de tiu periodo estas:

1. Международный язык эсперанто: полный учебник. Б. Г. Колкер. Tiu estis eldonita en 1992 kaj 2012, kvantoj: 10500 kaj 1000 ekz.

2. Методические разработки по языку эсперанто. Абольская Мери Соломоновна. Kun certa noto, ke la lernolibro aperis ankoraŭ en Sovetunio, en 1990. La eldonkvanto: 20000 ekz. Dank'al tiom granda eldonkvanto la lernolibro estis vaste uzata en la lando dum la 1990-aj jaroj.

Krom tiuj du elstaras serio de E-lerniloj, eldonitaj de eldonejo «Vostok-Zapad» en 2006-2007:

3. «Язык эсперанто за один месяц. Самоучитель разговорного языка» de Irina Gončarova.

4. «Учебник языка эсперанто. Начальный курс» de Irina Gončarova.

5. «Элементарная грамматика языка эсперанто» de N. Gudskov,

6. «Факты и краткие сведения об эсперанто» de N. Gudskov.

Ĉiuj libroj havis eldonkvanton po 2000 ekz. La grava momento pri ili estis, ke libroj de «Vostok-Zapad» dum kelkaj jaroj estis troveblaj en plej diversaj librovendejoj de Rusio.

7. Laste nepre menciindas lernolibro de Abdurahman Junusov: «Эсперанто? Это просто!»

Учебник международного языка. Ĝiaj eldonoj aperis kvarfoje en E-eldonejo «Impeto», en 2000-2001 kaj 2014, suma eldonkvanto: 2500 ekz.

Ĉiuj ceteraj E-lernolibroj, aperintaj en la priparolata periodo, havis etajn kvantojn de 100 ĝis 1000 ekz. -- kaj ne aperis en la grandaj librejaj retoj.

En la nuna periodo miascie oni ne povas aĉeti ajnan E-lernolibron en librovendejoj kiel «Bukvoed/Ĉitajgorod» aŭ aliaj libretoj. Malnovaj E-lernolibroj estas foje vendataj en brokantaĵaj vendejoj kaj en retaj revendejoj kiel Avito, Ozon k. s.



Tipoj de lerniloj

Ĉiuj priparolitaj lernolibroj estas tradiciaj, paperaj;

Ekde la komenco de la vasta uzado de Interreto aperis retaj E-kursoj, retaj lernolibroj. Plej ofte tio estas tradiciaj lernolibroj en la elektronika formato. Plej ofte tio estis la samaj konataj al ni tradiciaj E-lerniloj de B. Kolker, A. Junusov, al kiuj aldoniĝis kelkaj neniam aperintaj surpapere lernolibroj de Gakalenko, Galiĉskij, Pentus — kaj kelkaj miaj;

- komputilaj, retejaj, telefonaj: la plej nova speco de E-lerniloj. En nia lando aperis neniu el ili, sed kelkaj internaciaj komputilaj E-lerniloj havas interfacon ankaŭ en la rusa — kiel la konata brazila kurso.

Oni povas studi Esperanton helpe de la rusa lingvo en la internacia studa retejo Lernu.net.

En tre populara telefona aplikaĵo Duolingo ne eblas studi Esperanton helpe de la rusa, tamen mi plurfoje renkontis rusianojn, kiuj studis/studetis nian lingvon helpe de iu alia lingvo, plej ofte la angla.

La manko de ruslingva komputila/telefona lernilo estas tre bedaŭrinda. Feliĉe almenaŭ telefonaj vortaroj rusaj-Esperantaj / Esperanto-rusaj ekzistas.

Metodoj de instruado en la lernolibroj

Absoluta plimulto de la lerniloj estas en la «klasika» metodo: t. e. kiel oni instruas en la lernejoj fremdajn lingvojn, tiel ankaŭ ni instruu Esperanton.

Iom diferencas de tiu tradicia metodo la lerniloj de Mikaelo Bronŝtejn: «Mamutido Miĉjo» kaj lernolibroj de Irina Gončarova:

- unu el lerniloj de Irina Gončarova estas bazita sur Zagreba metodo, kiu intensigas lernadon per minimumigo de la baza vortostoko, trovita per ofteca vortaro;

- alia estas konstruita ĉirkaŭ instrua romaneto «Gerda malaperis!» de Claude Piron.

- similas al la principo de «Gerda malaperis» lerniloj de Mikaelo Bronŝtejn, kiuj ankaŭ celas enlogi la lernantojn en interesan

legadon kaj nur sekve de tio en lernadon.

Rusigita lernolibro de slovaka e-isto Stano Marček «Эсперанто прямым методом» instruas la lingvon sen partopreno de la nacia — helpe de bildetoj. Ĝi tamen bezonas subtenon flanke de instruisto.

Per vigla konversacia maniero allogas studenton lerniloj de Aleksandr Melnikov: Эсперанто для дотошных (2006, 300 ekz) kaj «Ученье — без мученья» (1999, eldonkvanto: nekonata).

«Эсперанто 2055: Автоостоп в космосе» estas plia netradicia lernilo. Ĝi estis verkita por reta kursejo, kiun abonis ĉ. 6 mil lernantoj. Beletrstile ĝi rakontas pri vojaĝado de la ĉefa heroo, kiu intertempe studas Esperanton.

La paperaj E-lernolibroj malaperas

Dum la moderna periodo de nia lando la paperaj ruslingvaj E-lerniloj aperis en la kvanto ĉ. 60 mil ekzempleroj. Tamen pli ol duono el tiu kvanto aperis tuj antaŭ la disfalo de Sovetunio (Abolskaja, 1990, 20000 ekz.) kaj tuj poste (lernolibroj de Kolker, en 1992, 1994 -- sume 14500 ekz.).

Nun en la librokomercaj retoj ne plu restis iuj stokoj de E-lerniloj, apartaj ekzempleroj ankoraŭ troveblaj brokante.

La situacion certagrade savas abundo de elektronikaj versioj de pluraj paperaj E-lerniloj, kiuj estas elŝuteblaj senpage.

Tezoj por nia komuna pripensado

- Ne ekzistas modernaj ruslingvaj E-lerniloj. La lastaj aperis antaŭ pli ol 15 jaroj.
- La malnovaj sovetiaj kaj rusiaj E-lerniloj estas kvalitaj enhance, sed tipografie malgajnas al la modernaj normoj por tiaj lernolibroj, al kiuj studemuloj al kutimiĝis en la lernejoj, atlernejoj kaj librokomercaj retoj.
- Ne ekzistas telefonaj aplikaĵoj, kiuj permesus studi E-on ruslingve.

Andrej Grigorjevskij

Kluba vivo

Aranĝoj de Esperanto-societo «Kariljono» (Sankt-Peterburg)

Renkonto la 16-an de novembro

La 16-an de novembro 2023 en Biblioteko N 1, je 1 km for de la metrostacio «Ĉjornaja Reĉka», laŭ str. Torĵkovskaja 11, je la 17-00 h. okazis vica renkonto de Esperanto-societo «Kariljono». Partoprenis 7 personoj.

Temoj de la vespero estis:

1. Pridiskuto de artprogramo por la 26-a de novembro, ĉar laŭ adreso Litejnij 60, je la 16-00 okazos artvespero de Mikaelo Bronŝtejn. Laŭ komuna opinio ni decidus, ke la ĉeftemo prelegota de Mikaelo Bronŝtejn estas: La verkoj kaj vivtragedio de Osip Mandelŝtam. Ankaŭ estas bonvena 24-minuta filmo «Vasilij Eroŝenko». Se estos tempo — ni spektos ĝin, se ni ne havos tempon — do ni kopios ĝin por spekti estonte.

2. Prelego de Andrej Grigorjevskij pri lernolibroj eldonitaj en Sovetio kaj nuna Rusio. Laŭ «Katalogo de Esperanto-lerniloj, verkitaj, eldonitaj, enretigitaj en RSFSR kaj Rusia Federacio (1957–2019)» kompilita de: Irina Gonĉarova, Nikolaj Gudskov, Vladimir Opletajev, Svetlana Smetanina estas informoj pri 84 unuoj. Pri ĝenerala eldonkvanto evidente neniu scias, ĉar estis verkitaj manskribitaj lerniloj en 10-20 ekz. kaj la plej granda eldonkvanto apartenas al lernolibro de Andrejev eldonita je 95 000 ekz.

Necesas ankaŭ konsideri lernolibrojn eldonitajn en la 1920-1930-aj jaroj. Laŭ ne kompletaj informoj temas pri lernolibroj verkitaj de Helena Sazonova, Dmitrijev kaj Medem, Ivan Lidin, Jakov Voleviĉ, Varvara Seriševa, Sergej Rublev, Vasilij Svistunov, Ernest Drenzen kaj Vladimir Varankin. Pri la eldonkvanto necesas kalkuli aparte. Tamen estas jam konataj ciferoj. Ekzemple inter 1924 kaj 1930 estis venditaj entute pli ol 175 000 lernolibroj.

Por havi pli-malpli proksiman scion pri lernolibroj eldonitaj ĝis 1913 ni devas konsideri informlibron kompilitan de Georg Davidov, eldonitan en 1912. En ĝi estas listo pri pli ol 100 lernolibroj eldonitaj de 1887 ĝis 1912.

3. La vica renkonto en sekva jaŭdo ne okazos, ĉar ni renkontiĝos en Asocio de Internacia Kunlaboro, laŭ adreso: Litejnij 60, je la 16-00.

4. Provludo de samklubaninoj pri prezentota teatraĵeto.

Registris Anatolo Sidorov.

Artvespero de Mikaelo Bronŝtejn

Karaj amikoj!

La 26-an de novembro sukcese pasis artvespero de Mikaelo Bronŝtejn.

En la asocio de internacia kunlaboro okazis prezentado de Mikaelo Bronŝtejn pri Osip Mandelŝ vivtragedio tam. La aranĝo okazis en amika etoso. Valerija Jareŝko kantis plenanime romanojn laŭ versoj de la poeto.

Dum vespero funkciis libra butikoj. La gastoj gustumis ornanĝan sulon kun bombonoj. Ankaŭ estis komuna fotado.

Anatolo Sidorov



Andrej Grigorjevskij

26 novembro 2023 je 16:00 **Litejnij pr-t, 60**
Asocio de Internacia Kunlaboro

Esperanto-klubo «Kariljono»

La verkoj kaj la vivtragedio de

Osip Mandelŝtam

Pri la vivo kaj verkoj de "la plej grava rusa poeto de la 20-a jarcento" (laŭ Anna Aĥmatova) rakontas

Mikaelo Bronŝtejn,

kunordiginto de internacia projekto pri tradukado de verkoj de la poeto en Esperanton.





Mandelŝtam-vespero



Renkonto la 7-an de decembro

La 7-an de decembro 2023 en Biblioteko N 1, je 1 km for de la metrostacio “Ĉjornaja Reĉka”, laŭ str. Torĵkovskaja 11, je la 17-00 h. okazis vica renkonto de Esperanto-societo «Kariljono». Partoprenis 6 personoj.

Temoj de la vespero estis:

1. Gramatika vespero: kompreni diferencojn inter similaj vortoj.
Ekzemple: ĝentila kaj afabla; Kaŭzo kaj motivo; Pardonu, indulgi, ekskuzi.
2. Pridiskuto pri la programo por Zamenhof-vespero okazonta la 17-an de decembro, laŭ Litejnij, 60. Komenco je la 17-00, la prepara teamo je la 16-00.
3. Provizora programo estas: a) Kanti himnon de Esperanto. (Bonvolu parkeri la tekston; b) muzika akompano far' Nadejda Kuleŝova; c) Valeria Jareŝko gitarludos kaj kantos; ĉ) Katerina Ŝatrova pianludos.
4. Dum la vespero funkcios libra butikoj; fotokronikisto registros partoprenantojn.
5. Por distri publikon estos kvizo. Ĉiuj dezirantoj preparas demandojn ligitajn al E-movado, E-libroj kaj Zamenhofo. Gajninto estos premiota.
6. Kafo- aŭ te-paŭzo kun kukoj farĉitaj je brasikaĵo, viandaĵo k.c.
7. La vica renkonto okazos la 14-an de decembro. Temo estas: Zamenhofo-vivo-verkoj-heredaĵoj. Ankaŭ pridiskuto de la programo por Zamenhof-vespero.

Registris Anatolo Sidorov



Zamenhof-festo en Moskvo

La Zamenhof-festo okazis en Moskva E-klubo «Lev Tolstoj» la 11-an de decembro.

Tute novan kaj interesan materialon pri Zamenhof kiel kuracisto alportis N. Gudskov. Tio estas rememoroj de Gabriel Berger en la ĵurnalo « Esperanto en Berlino kaj Brandenburgio ».

Sekvis «Enigmoj de Ludoviko Zamenhof» far S.Smetanina, lingva ludo kaj tre abunda riĉa tablo kun bungustega vino.

Svetlana Smetanina



Zamenhof-tago en Sankt-Peterburgo

La 17-an de decembro la membroj de EK «Kariljono» kaj E-gastoj de la urbo kunvenis en Litejnij, 60 — la ejo de la Asocio de Internacia Kunlaboro.

Malgraŭ la amasa malsanado en la urbo, pluraj klubanoj tamen kuraĝis ĉeesti kaj ĝui la programon.

Malfermis la vesperon la saluta deklamado de Mikaelo Bronŝtejn, kiu prezentis sian ĵus kreitan versaĵon omaĝe al L. L. Zamenhof kaj gratulis la ĉeestintojn pri la Z-tago kaj la Tago de E-libroj.

La ĉefa ornamaĵo de la programo estis piana prezento de Jekaterina Ŝatrova (Kazanj), renoma rusia komponisto kaj esperantistino, kiu nun «plialtigas la kvalifikecon» en la Sankt-Peterburga konservatorio. Katja virtuoze pianludis proprajn verkojn — foje akompanata per fluto de koleginino — Aleksandra Zabajkina.

Mikaelo Kolodin daŭrigis la programon per recitado de propraj versoj. Poste denove sonis piana muziko, plenumita de Nadejda Kuleŝova.



Kronis la programon kelkaj pliaj versaĵoj, deklamitaj de Mikaelo Bronŝtejn kaj salutvortoj de nia gasto el Volgogrado — Tatjana Vtorova, kies vizito al SPb bonŝance koincidis kun nia festo.

Post la programo la klubanoj kaj gastoj estis invititaj por komuna teumado kun bongustaj kukoj.

Andrej Grigorjevskij



Zamenhof-festo en Tjumeno

Kiel informas lokaj organizantoj, la Zamenhof-feston-2023 en Tjumeno entute partoprenis 27 personoj: Tjumeno — 18, Jekaterinburgo — 6, Omsko — 1, Surguto — 1, Tobolsko — 1. Krome per anticipe videoregistrataj salutmesaĝoj kaj per Zoom-alparoloj pluraj geamikoj el pli ol 10 urboj kaj unu aktivulo el Kubo afable gratulis kaj ĝoje entuziasmigus la kunvenintojn. La feston partoprenis 6 veteranoj de la esperantista klubo “Revo”, kiuj ekaktivis en la 1970aj jaroj. La tjumenaj gastigantoj multe klopodis, por ke la renkontiĝo pasu en bona kaj komforta etoso, nun ili atendas reeĥojn, opiniojn, impresojn pri la pasinta ZF.

Kompilante programon de la Zamenhof-festo, ĝiaj organizantoj celis oferti al gastoj materialojn, kiuj povis reflekti diversajn facetojn de la tradicia decembra esperantista aranĝo: omaĝi al la Majstro, ekspone novajn kaj interesajn librojn en Esperanto, ĝui salutmesaĝojn de geamikoj el diversaj rusiaj urboj, distri ĉeestantojn per gitarmuziko, kantoj kaj dancoj. Ĉi-foje atentindan pretekston por nostalgiaj rememoroj aldone kaŭzis la 50-jariĝo de Tjumena esperantista klubo “Revo”, kies fondotago pasis la 28an de oktobro (1973 — 2023). Kelkaj personoj petis min publikigi miajn prezentaĵojn en la grupo “Zamenhof-festo en Tjumeno”. Mi dankas ĉiujn interesitojn kaj volonte aŝiŝas:

- fotoalbumon pri la klubo “Revo”, komencitan okaze de ĝia 40-jariĝo kaj daŭrigotan post la 50-jara jubileo;
- kvizon pri la Unua libro de Esperanto;
- materialojn por la biblioteka vespero “Historio de unu poemo en Esperanto”.

[VK: Zamenhof-festo en Tjumeno](#)



La festa decembra kunveno de uralaj esperantistoj en Tjumeno

Estas tre ĝoje konstati, ke bela tradicio de urala esperantistaro kunfesti Zamenhof-tagon kaj Tagon de la Esperanta libro sukcese daŭras. Kutime la festo ĉiam pasis en la urala ĉefurbo. Sed ĉi-foje, kiel estis antaŭe planite, decembra festa kunveno de uralanoj okazis en Tjumeno. Kaŭzo por tio estis la glora 50-jara jubileo de tjumena esperantista klubo “Revo”.

Tial nia brava kvinkapa grupo de jekaterinburgaj esperantistoj frumatene sabate forlasis la urbon kaj per privata aŭto de Sergej Kumkov direktiĝis al Tjumeno. Onidire, agordiloj de animo komencas funkcii de matene. Nia bonhumora kompanio veturis vigle interbabilante kaj ŝercante; la tago estis vere bela: al ni favoris la vetero kaj fine post pli ol dumdektagaj fortaj uralaj frostoj ĝis -30 gradoj kaj pli, la vetero mildiĝis, forestis eĉ venteto kaj la leviĝanta surhorizonte frambruĝa suno vekis nian sinceran ĝojon kaj preskaŭ infanan ravon. Antaŭ ni etendiĝis neĝa, blanka vojo, nin atendis suna vintra tago kaj ĝoja renkontiĝo kun geamikoj!

Kaj jen, nerimarkeble, ni jam atingis Tjumennon kaj tiean kunvenejon, kie en la vintra tago de la 16-a de decembro tjumenaj esperantistoj akceptis gastojn-geamikojn el kelkaj najbaraj urboj kaj invititajn samurbajn veteranojn de la sepdekaj jaroj. Estis agrablege denove vidi karajn vizaĝojn de la geamikoj, aŭdi iliajn ĝojajn voĉojn, senti amikajn varmajn brakumojn. Entute la festo kunvenigis 27 homojn el 5 urboj: Jekaterinburgo — 6 esperantistoj; Omsko — 1; Surguto — 1; Tobolsko — 1; Tjumeno — 18.



La loka organiza teamo faris grandan preparlaboron, trovinte konvenan ejon por la aranĝo, bele ornaminte ĝiajn du disponigitajn por ni salonojn, en unu el kiuj pasis la festa programo kaj en alia estis aranĝita tablo kun regalaĵoj por la amika festeno.

La programo de la aranĝo estis varia kaj aspektis kiel miksaĵo el serioza, amuza kaj lirika ĝenroj. Ĝi konsistis el tri grandaj partoj; en la unua — uralaj esperantistoj omaĝis al la iniciatinto de Esperanto. Tial ĝi komenciĝis per la sonigo de la freŝverkita de Mikaelo Povorin kanto, dediĉita al Ludoviko Zamenhof, post kiu Vladimir Opletajev konigis al la ĉeestantoj kelkajn tradukojn de la fama Zamenhofa poemeto “Ho, mia kor!”, kolektitaj de li. La prezentaĵon sekvis surekrane la video, en kiu brazila esperantisto Paŭlo Sergio Viana rakontas pri la interesa artikolo el la revuo “Esperanto”, kies aŭtoro skribas pri la nekonata fakto el la vivo de L. Zamenhof — pri la inventita de li skribmaŝino.

La dua parto de la programo estis dediĉita al la Tago de la Esperanta libro, kaj ĉi tie okazis interesa kvizo pri la Unua libro, kiun partoprenis la plejparto de la ĉeestantoj. Surekrane estis montritaj demandoj kaj tri respondoj el kiuj necesis elekti la ĝustan, marki poste per kruceto sur la aparta folio ĉiujn korektajn respondojn kaj fine anonci la rezulton. Al kvar perfektaj gajnintoj Vladimir enmanigis kiel premion siajn aŭtorajn librojn.

Laŭ la delonga tradicio de jekaterinburgaj Zamenhofaj tagoj estis prezentitaj kelkaj lastatempe eldonitaj Esperanto-libroj, kaj ĉi-jare Raja Kudrjavceva elektis por la prezentado tiujn 3: 1) la poemaron de la tradukitaj verkoj de O. E. Mandelŝtam; 2) la originale verkitan romanon de M. Bronŝtejn “Simeono” — ambaŭ libroj estas eldonitaj de la Moskva eldonejo “Impeto”; 3) la 6-n kajeron el la serio “Esperanto por mi”, kiun eldonas elstara japana esperantisto Hori Jasuo en la kunlaboro kun la germana profesia grafikistino kaj esperantistino Helga Ploetner, kie sur la 7-a paĝo aperis artikolo-rakonto pri Raja Kudrjavceva kun ŝia portreto, desegnita de Helga.

La tria parto de la programo estis dediĉita al la 50-jara jubileo de “Revo” kaj dum ĝi okazis portempa mergiĝo en rememorojn pri la historio de la klubo kaj pri la klubo vivo kaj agado en antaŭaj jaroj. Vladimir Opletajev, kiu estis unu el la fondintoj de la klubo kaj, cetere, jam duonjarcenton esperantumus, kaj la klubo aktivulino de pli posta generacio Galina Lopareva montris sinsekve la prezentaĵojn, preparitajn de ili por la jubileo de “Revo”; estis abundo de malnovaj fotoj kun la aŭtoraj komentoj kaj rememoroj. Kaj certe veteranoj revenis rememore en tiujn tagojn, kiam ĉio, montrita surekrane, okazis en realo. Ĝenerale necesas rimarkigi, ke tĵumenanoj zorge konservis multajn dikegajn klubajn albumojn kun fotoj el pasintaj jaroj, ili ĉiuj estis kunportitaj, kaj ĉiu deziranto povis preni kaj foliumi ilin.

Post la rememoroj de la veteranoj, la tuta ĉeestantaro estis invitita al la salono, kie atendis la preparita festa tablo. Sed antaŭ la festeno ĉi tie okazis duonhora komunikigo per Zoom kun aliurbaj geamikoj-esperantistoj, kiuj aperis surekrane speciale por saluti ĉiujn partoprenantojn de la festo kaj por gratuli tĵumenanojn okaze de la jubileo. Sonis varmaj salut-kaj gratulvortoj el diversaj rusiaj urboj: Ĉelabinsko, Kovrovo, Miasso, Moskvo, Niĵnij-Tagilo, Novosibirsko, Rigo, Sankt- Peterburgo, Stavropolo, Tiĥvino, Ufo; sonis speciale verkitaj porjubileaj poemoj de M. Bronŝtejn kaj T. Vŝivceva, kaj plenumita de Sergeo Straŝnenko la ŝatata vintra kanto de lia esperantista juneco kun la konata titolo “Din-don”. Ankaŭ estis tute surpriza aliĝo kaj virtuala amika saluto kaj gratulo de kelkaj aktivuloj-esperantistoj el Kubo, ligan kun ili organizis esperantistino Lisandra Gonzalez, nun loĝanta en Tĵumeno. Entute tiu ĉi parto de la programo estis tempo, kiam okazis la “fajraĵo” de ĉies emocioj, ĉiuj kuntostis, gustumis preparitajn regalaĵojn, interŝanĝis amikajn donacetojn, al ĉiuj ĉeestantoj estis enmanigitaj agrablaj memoraĵoj — verdkoloraj brelokoj el ledo kun la surskrivo “Revo” — 50-jara, kiujn speciale mendis okaze de la evento tĵumenaj esperantistoj Ksenija Baklickaja kaj Jevgenij Volkov kaj poste donacis al ĉiu partoprenanto. Konate estas, ke la komuna kunmanĝo kutime tre bone unuigas homojn. Do, certe ekregis tre ĝoja kaj plena de entuziasmo etoso! Sed dum tiu neformala amika interkomunikado ankaŭ estis paŭzo por realigi la ideon pri nia komuna koncerto, kaj ni kune denove translokiĝis en la najbaran salomon. La koncerton komencis la kanto “Admiru, amikar!” de B. Okudĵava en Esperanta traduko, kiun akompane de la gitarludo plenumis jekaterinburgano Sergej Kumkov. Poste ĉiujn atendis la granda surprizo: la partopreninta la festan kunvenon esperantistino Lisandra Gonzalez (la edzino de la tĵumena esperantisto Stanislav Belov), kiu devenas el Kubo kaj nun loĝas en Tĵumeno, preparis kun la partnero-kubano Erik nacian dancon “Salso”, kiu tuj altiris la atenton de la publiko. La dancado estis vere brila kaj iĝis la plej belega perlo de la tuta koncerta programo! Post la danco ankaŭ okazis leciono pri tio, kiel danci salson kaj ĝin partoprenis kelkaj uralanoj el Jekaterinburgo kaj Tĵumeno. La programon daŭrigis la kantado de la vintra kanto je vortoj de D. Samojlov en la traduko de M. Bronŝtejn “Nomoj de la vintroj” fare de esperantisto el Jekaterinburgo Viktor Kulakov, sonis ankoraŭ kelkaj kantoj en la plenumo de gitaristo S. Kumkov. Ankaŭ okazis deklamado: V. Opletajev prezentis la belan poemon “Vintra fabelo” de N. Ĥoĥlov, Raja Kudrjavceva — la vintran poemon de M. Giŝpling.

Post la koncerto ĉiuj estis invititaj trinki teon kun la bongustegaj tortoj, membakitaj de tĵumenanino Nastja Golovkina! Oni forŝaltis la lumon en la ĉambro, ĥore kantis “Ĉion bonan al vi!...” kaj nur malrapide brulis du kandeloj — la cifero 50...

Dum tiu ĉi festa kunveno estis multaj mirindaj kaj memorindaj momentoj. Mi klopodis priskribi kiel eble detale, kiel ĉio pasis, por ke povu imagi al si kaj eksenti la feston tiuj, kiuj ne povis ĝin partopreni. Se analizi pli profunde, verŝajne eblus trovi ankaŭ iujn malglataĵojn, momentojn de iu nesukceso, sed ŝajne, ne ĉion en la vivo necesas pritaksi, necesas ion simple aprezi.

Estas granda ĝojo por mi, ke Esperanto povis unuigi nin ĉiujn tiuvespere, kaj nia renkontiĝo donacis al mi persone tiom da pozitivaj emocioj kaj impresoj! Mi esperas, ke ankaŭ aliaj partoprenintoj memoros, kiel ni festis tiun ĉi Zamenhof- tagon kaj la 50-jariĝon de la klubo “Revo”...

Mi ŝatus fini mian rakonton per esprimo de mia kora dankemo al la tĵumenanoj pro la agrabla gastigado, al la mastrino de la vespero Nastja Golovkina kaj al ĉiuj ceteraj, kiuj kontribuis por la sukceso de tiu ĉi aranĝo!

Raja Kudrjavceva, Jekaterinburgo

P. S.: Por vidi pli da fotoj de la evento vizitu la grupon en VK: <https://vk.com/ekaterinburgo>



Juna fororientano prezentis sin en Esperanto en TV-programo

«Pli saĝa ol ĉiuj» («Умнее всех») estas porlernejana cerbumludo en la televidkanalo «Пятница» gvidata de Tina Kandelaki, la nova analogo de iama projekto «La plej saĝa» («Самый умный»).

Nun estas montrata la 2-a sezono. En la 5-a ludo, montrita la 2-an de novembro, unu el ludantoj, 13-jaraĝa Aleksandr Volkov el Komsomolsko-ĉe-Amuro, faris salutajn vortojn en Esperanto: «Mi estas Aleksandro, geografiisto, historiisto kaj poligloto». Poste, en la 2-a raŭndo, li rakontis pri sia nova hobbio, la lingvo Esperanto. Estis agrable rigardi kaj vidi, ke li estis unu el avanuloj dum la tuta ludo. Li venkis la finalan raŭndon kaj transiris al la ĉefa ludo de la sezono, montrata en la fino de decembro aŭ jam en januaro.

Estis ne unufoja partopreno de Aleksandr, li ankaŭ ludis en la 1-a sezono de la projekto. Sed esperante li ekparolis nur nun.

En interreto vi povas [legi la noticon-superrigardon](#) de la ludo en la rusa aŭ [spekti la televidelsendon](#) mem.



Aleksandr Volkov

Aleksandro Mitin

Lingvofestivalo

La 17a Moskva Lingva Festivalo

La 17a Moskva Lingva Festivalo pasis en la tradicia tempo, tradicia ejo kaj tradicie sukcese la 10-an de decembro 2023 en la fakultato de la neekzaktaj sciencoj ĉe la Supera Lernejo pri Ekonomio. Kaj tradicie ĝin organizis Moskva Esperanto-Asocio MASI kun la eta festivala teamo, kuordigata de Oleg Ĉajka.

Ĉio pasis sen iuj rimarkeblaj kolizioj aŭ speciale elstaraj okazintaĵoj, sed la evento restas bela travivaĵo kaj por la organizantoj, kaj por la konstantaj partoprenantoj, kaj por la multnombraj novuloj, jes, certe, — speciale por ili.

Niajn festivalojn karakterizas senpompa atmosfero, hejmeca etoso kaj elstare altkvalita programo ĉe grandioza skalo de la aranĝo. Estis prezentitaj ĉ. 65 lingvoj de la mondo, 30 lingvistikaj prelegoj, 20 majstro-klasoj kaj 15 lecionoj por infanoj.

La konsisto de la programkontribuantoj signife ŝanĝiĝis. Multaj niaj “steloj” lasis la landon, sed venis aro da novaj prezentantoj — kaj altlernejaj instruantoj sciencistoj, kaj talentaj gestudentoj, kaj brilaj lernejanoj. Por ni, kiuj anticipe konatiĝis kun la novuloj dum la interretaj konferencoj antaŭ la festivalo, ŝajnis, ke tiu fluo de talentuloj neniam elĉerpiĝos...

La konata esperantisto, akademiano Nikolao Gudskov jenon rakontas pri siaj impresoj:

“La festivalo pasis tradicie bone kaj vigle. La programeroj, kiujn mi sukcesis ĉeesti — tiuj estis la prezentadoj de la hungara kaj la etruska lingvoj kaj la prelego de la lingvisto-esperantistino Larisa Micallef “Interinfluo de la artefaritaj kaj naturaj internaciaj lingvoj” — estis ĝenerale altnivelaj kaj bone strukturitaj. Laŭ la malferma «prezento de prezentoj» ĉio cetera estis ne malpli bona!

Mi mem faris du prelegojn. La unua temis pri lingvaj trajtoj de Esperanto, kiuj faras ĝin, spite al asertoj de famaj lingvistoj, reale vivanta kaj vigle evoluiĝanta lingvo. La dua prelego estis miaj meditoj pri la libro de Florian Coulmas «Gardantoj de la lingvo», el kiu sekvas, unue, ke ĉiuj evoluintaj lingvoj estas, fakte, planlingvoj, inter kiuj Esperanto estas nur «unu el» kaj, due, por konscia evoluigo de la lingvoj koncernaj personoj inspiriĝis je certaj politikaj ideoj — imperiismaj, klerismaj, naciismaj (plimulto...), internaciismaj. Sekve, praktika lingvistiko estas speco de politika agado.

En miaj prelegoj ĉeestis po ĉ. 10-15 personoj, en la unua — plejparte neesperantistoj, en la dua — ĉiuj neesperantistoj. Inter la plej interesaj demandoj estis la jena: «Ĉu esperantistoj estas sekto?» Mi respondis, ke ĉiu komunumo, kiu posedas certan scion, kiun necesas alproprigi por aliĝi al ĝi (ĉu filokartistoj, ĉu ŝakistoj, ĉu sciencistoj de certa fako) aspektas kiel sekto — do, se oni volas uzi tiun nomon, kial ne?”

Krom la tri menciitaj programeroj, ligitaj al Esperanto, estis, kompreneble, rakontoj pri la lingvo mem. Tute diversajn prezentadojn de Esperanto faris Aleksandr Blinov (u. Ĉeboksaro), Roman Ralko kaj Petro Fedosov. Krome estis aparta programero pri la memoj kaj blogoj en la interreto, kiun faris la novulo Vadim Fedulov. Dum la malgranda malferma koncerto far’de la festivalaj prelegantoj Oleg Ĉajka kantis en Esperanto. Kiel ĉiam, Esperanton oni menciadis tra la tuta tago ofte kaj ĉie. Indas konsideri, ke por la festivalo registriĝis pli ol 1700 gastoj.



Irina Gonĉarova,
direktoro de la Moskvaj Lingvaj Festivaloj

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 1143 2023-11-21

INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO (INK): 4-A ELDONO LANĈITA KUN NOVA TEMO

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) alvenas kun nova temo: Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens. La kvara eldono de la konkurso estis lanĉita dum la oktobra Retoso kaj estas rezulto de daŭra kunlaboro kun la Akademio Literatura de Esperanto (ALE), Bobelarto kaj aldone aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj per la eblo konkursi en ses diversaj lingvoj: krom Esperanto, eblas konkursi en la itala, la kataluna, la persa, la rusa kaj la ukraina. Tradukaĵoj el aliaj lingvoj daŭre bonvenas.

Eblas gajni en la du kategorioj de komencantaj kaj spertaj verkistoj entute dek monpremiojn kun la suma valoro 4500 eŭroj. La prezidanto de la konkurso estas irana esperantisto Ahmad Mamduhi, kiu estas ankaŭ prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).


Noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi **maksimume 2000 vortojn** (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longo. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas menciigi en la sendoformularo. Konkursi eblas per **du noveloj**.

La limdato por konkursi estas la 30-a de junio 2024.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: bobelarto.ink/konkurso.

Kadre de la tria eldono, kies temo estis La sekreta vivo de miaj najbaroj, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 1331 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 48 landoj. La gajnintoj estos anoncigitaj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 109-a UK, okazonta en Aruŝo, Tanzanio (3 aŭgusto-10 aŭgusto 2024). Por aliĝi al la kongreso, vizitu: uea.org/kongresoj/alighilo.

La du novel-rikoltoj de la antaŭaj eldonoj de la konkurso estas aĉeteblaj en la Libroservo de UEA (Amo, tuso kaj forpaso katalogo uea.org/katalogo.php?inf=669 kaj La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=233), ankaŭ ĉe eldonejo KAVA-PECH (Amo, tuso kaj forpaso kaj La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj).



Konkursoj

Ĉu vi estas verkemulo?

Partoprenu la Internacian literaturan Esperantan konkurson “Hristo Gorov-Hrima”-2024.


Hristo Gorov-Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partoprenigeesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por rakonto kaj eseo.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman — 12 punktaj

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2024 al Georgi Mihalkov, prezidanto de la ĵurio, retadreso: modest.mihalkov@gmail.com



In memoriam

Forpasis Nikolao Makovej

La 21-an de novembro forpasis barnaula esperanto-aktivulo **Nikolao Ivanoviĉ Makovej**. Kondolencojn al la barnaula klubo kaj al amikoj de Nikolaj.



Informo de Ikar Akimenko: *Nikolao Ivanoviĉ Makovej forpasis hieraŭ. Mi ne havas vortojn por esprimi miajn sentojn. Li estis mia amiko kaj instruisto. Iama prezidanto de nia klubo. Li estis vere bonanima kaj bonkora homo. Tre inteligenta, saĝa, afabla, amikema. Ĉiam vigla kaj juna anime — tia li restis en mia memoro.*

Moskva Esperanto Centro vendas, interŝanĝas, donacas diversajn lernilojn, vortarojn, librojn, revuojn, ktp.

Interesitoj bv turni vin kun petoj kaj demandoj al Svetlana Smetanina:
telefonnumero (ankaŭ vacapo) +79266083244,
svsmetanina@yandex.ru



Aliĝu al REU!

Restu kun ni en la 2024-a!

Karaj geamikoj, la nuna jaro kuras al la fino, kaj jam baldaŭ ekos jaro la 2024-a!

Ni esperas, ke nunaj membroj de REU daŭrigos sian membrecon ankaŭ en la nova jaro kaj memoras pri membrokotizoj.

Vi estas bonvenaj pagi la membrokotizojn-2024 fine de la nuna aŭ komence de la nova jaro.

La kotizo:

- de individua membro estas 250 rubloj;
- de aligita membro de aliĝinta kolektivo — 200 rubloj (kolektivo pagas samtempe por minimume 5 anoj);
- gejunuloj 14-17-jaraĝaj povas aliĝi senpage kiel «kandidatoj»;
- eksterlandanoj povas aliĝi senpage kiel «amikoj de REU».

Pagmanieroj

Sberbank

Al la banka karto:

2202 2054 4461 5378

(Maria Fedorovna V).

La karto estas ligita al la telefonnumero:

+7 (996) 779 32 13

Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro vi devas informi pri via pago la kasiston Maria Verzun:

- Telegramo: <https://t.me/mariaverzun>
- Telefonnumero: +7 (996) 779 32 13
- Retadreso: mverzun88@gmail.com

Vi devas informi pri celo de la pago, ĝirita sumo kaj nomo(j) de homo(j), por kiu(j) estas destinita la pago. Se vi ne informos nin, la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!

Bonvolu atenti!

La nova adreso de «Ponto» por viaj novaĵoj estas

revuo@reu.ru

“Ponto” [Bulteno de REU (BdR)] estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “RUSIA ESPERANTISTA UNIO”

La revuon aŭtomate ricevas ĉiuj membroj de REU inklude Amikoj de REU.

Ĉiuj ceteraj rusianoj povas aboni ĝin ĉe la Estraro kontraŭ 250 r. jare, alilandanoj kontraŭ 8 eŭroj.

“Ponto” atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al la retroŝto revuo@reu.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio